

V-19479/44 1975

Bulgara

ESPERANTISTO





La sovetaĵ soldatoj fiksas la ruĝan standardon sur la Rajhstagon.



La iniciatintoj de Turka Esperanto-Asocio, kiu estis fondita la 11-an de majo 1975 en Istambulo.

ENHAVO

G. K. Ĵukov. Rememoroj kaj meditoj . . .	I
D. Penĉev. Rememoroj pri la milittempo . . .	1
D. Danĉev. La soveta soldato	3
A. Gaev. Jliĵa Miĥajlov — la Kamarado . . .	4
I. Keremidĉiev. Fervora kaj fidela E-ve- terano	6
I. Tanev. Cmaĝe al la 70-jariĝo de N. Nancv	6
G. Idakiev. Granda porpaca kunveno en Ĥaskovo	7
M. Kamenova. Manifestaĵo de esperan- tistoj en Asencvgrad	8
L. Nikov. La X-a jubilea konferenco de BEJ	9
St. Darĝonov. Tridek pacaj jaroj en mia vilaĝo	10
T. Kulagin. Esperanto-aktivecoj en Sovet- unio	11
St. Ĝuĝev. Interlingvistika utopiismo . .	12
A. Vaĥilaviĉius. Pri la senco de la slo- gano „Amikeco trans limoj“	15
R. Grinŝpan. Sen kompliko, sen koliko Esperanta gramatiko	III

Sur la kovrilpaĝo :

La monumento de la Soveta Armeo en Sofio

**REMEMOROJ KAJ MEDITOJ**

G. K. JUKOV —marŝalo de Sovetunio

— Preparante sin por la lasta ofensivo kontraŭ la faŝismo, la soveta militistaro strikte sin apogis sur la interkonsento kun siaj aliancanoj pri senkondiĉa kapitulaco de Germanio kiel en la milita, tiel en la ekonomia kaj politika sfero. Nia ĉefa tasko estis likvidi la faŝismon en la germana socio kaj ŝtato, severe puni la gravajn krimulojn, kiuj ordonis kruelaĵojn, masakrojn, ruinigon de urboj kaj vilaĝoj, humiligon al la popoloj en la okupitaj landoj kaj precipe en nia multsuferanta patrolando.

— La Berlina Operacio estis la lasta mejloŝtono sur la heroeca multmil-kilometra vojo, kiun la sovetaĵ soldatoj trairis batalante. Ili jam posedis sperton en grandaj bataloj, estis harditaj en tiuj kruelaj bataloj. Ĉiu soldato kaj oficiro arde strebis al baldaŭa frakaso de la malamiko kaj al finigo de la milito.

— En la frumateno de la 16-a de aprilo sur la tuta frontlinio la regimentoj ekmarŝis antaŭen. Tamen la malamiko baldaŭ reakiris spiriton kaj komencis kontraŭstari sur la altaĵoj Seelöwe; oni pafis per artilerio kaj minjetiloj. El la Berlina flughaveno alflugis grupo da bombaviadiloj. Ju pli antaŭeniris niaj trupoj, des pli kontraŭstaris la malamiko.

— La batalo por Berlino ne estis je vivo, sed je morto. El la interno de patrino-Rusujo, el Moskvo, el la urboj-herooj Stalingrad kaj Leningrad, el Ukrainio kaj Belorusio, el la respublikoj ĉe Balta Maro kaj el Kaŭkazo, el la ceteraj respublikoj marŝis okcidenten niaj samlandanoj por definitive frakasi tiujn, kiuj arogis sklavigi nian patrolandon. Multaj antaŭeniris kun ankoraŭ necikatriĝintaj vundoj. La vunditoj rifuzis eniri hospitalon. Ĉiuj estis kaptitaj de la dezirego atingi la finan celon — fiksi la standardon de la venko en la koro de Berlino.

— Kiel lasta operacio de la Dua Mondmilito en Eŭropo, la berlina ofensivo okupas specialan lokon. Per la konkero de Berlino estis solvitaj definitive la plej gravaj milit-politikaj problemoj, de kiuj dependis la postmilita strukturo de Germanio kaj ĝia rolo en la politika vivo de Eŭropo.

— Kaj jen finfine la ĉefaĵo, pro kiu nia popolo tiom multe suferis — definitiva venko super faŝista Germanio, triumfo de nia justa afero.

— La historia sperto de la Dua Mondmilito konfirmis la vortojn de Lenin, kiu diris, ke la soveta popolo fariĝas pli potenca post ĉiu kolizio kun la malamiko, dum la imperiismo suferas novan baton.

— La Granda Patrolanda Milito estis giganta kolizio inter la socialismo kaj la faŝismo. Ĝi estis tutpopola batalo kontraŭ la kruela klasa mal-

amiko, kiu arogis neniigi la vivosencon de la sovetaj homoj — la akiraĵojn de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, la sovetan regpotencon.

— Mi konkludas ne per miaj vortoj, sed per la belaj kaj veraj vortoj de Lenin: „Oni neniam sukcesos zenki popolon, kies laborista kaj kamparana plimulto lernis, sentis kaj vidis, ke ĝi defendas sian sovetan regpotencon — la regpotencon de la laboruloj; ke ĝi defendas la aferon, kiu ebligis al ili kaj al iliaj idoj ĝui la akiraĵojn de la kulturo kaj ĉion kreitan de la homa genio“.

El la libro „REMEMOROJ KAJ MEDITOJ“

HONORA VERDA TABULO

DE „BULGARA ESPERANTISTO“

La plej altan atingon en la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1975 havas s-ano

DIMITÂR PETKOV — E-instruisto en Gorna Orjahovica. Li kolektis 160 abonojn.

*Dankon al nia fervora samideano!
Sekvu lian ekzemplon! Abonigu plue!
Ni nepre atingu 5 000!*



REMEMOROJ PRI LA MILITTEMPO

de ekskolonelo DIMITÂR PENČEV — Ŝumen

La kontraŭfaŝisma militon (1944—1945) de nia lando mi partoprenis kiel vicleŭtenanto en 31-a Infanteria Regimento de Silistra. Tamen ĉi tie mi ne rakontos pri bataloj kontraŭ la germanaj faŝistoj, sed pri ordinaraĵoj homaj rilatoj, rilatoj inter diverslandaj geesperantistoj dum la milittempo.

Esperanton mi lernis en la Instruita Instituto en Ŝumen. Mi korespondis tiam kun Latvio, Usono kaj aliaj landoj.

Kiam en decembro de 1944 per milita

vagonaro ni estis transportitaj en Kroation, tie nia garnizono restis ĉirkaŭ dek tagojn en vilaĝeto R. Foje, vizitante miajn soldatojn por kontroli kiel ili loĝas, mi trafis hejman bibliotekon. Trarigardante la librojn, tute neaten-dite mi malkovris la poemaron de M. Ljubin „La himnon“. Mi eklegis kaj la dommastro min trovis tiel. Ni interkonatiĝis. Li estis tre surprizita: oficiro — kaj la Internacia Lingvo! Ankaŭ li estis instruisto, invalido. Ni ekparolis kiel kolegoj kaj samideanoj.



LA SOVETA SOLDATO

de Dančo Dančev

Sur monteto verda staras
en la suda urb' soldat'.
Super li lazure klaras
la ĉiel' —_fidela frat'.

Portas en la man' li sunon
kaj disdonas ĝin kun ĝoj'.
Li disdonas helan lumon
al la homoj sur la voj'.

Sur monteto verda staras
en la suda urb' soldat'.
Mateniĝe li signalas
pri la suna alvenad'.

Teron ame li karesas
dum floranta milda maj',
sian amon li konfesas,
sonas kantoj, regas gaj'.

Sur monteto verda staras
en la suda urb' soldat'.
Kaj solene li fanfaras
pri la venk' de l'rusa frat'.

Per amika vort' rakontas
li pri paco kaj liber'.
Kaj el lia koro fontas
amo, kredo kaj esper'.

La monumento de la soveta soldato (nomata Intime de la popolo „La monumento de Aljoŝa“) en Plovdiv



Li diris multajn flatajn vortojn pri miaj soldatoj kaj pri nia Popola Armeo.

Mia fronta vojo trapasis ankaŭ Zagreb. Iun vesperon, vagante sencele tra la stratoj de la urbo kun amiko oficiro, mi malkovris malgrandan klubojon de esperantistoj. Ni eniris: malgranda ĉambreto, sen forno. Estis frostoj. Maljuna viro kaj 5-6 gejunuloj staris ĉirkaŭ tableto, vintre vestitaj. La unuan momenton ili konfuziĝis pro nia neatendita apero, poste tamen rekonsciigis kaj rigardis nin iel malamike, kiel fremdajn militistojn. Sed mi salutis kaj alparolis ilin Esperante. Ili denove ekrigardis min kun mirigitaj okuloj, poste vigliĝis kaj ekridis. Ili havis kurson.

Komenciĝis interparolado pri la milito kaj faŝismo, pri la malsato. Jam ni sentis nin proksimuloj. Proksimigis nin Esperanto.

En urbo P., Hungario, tute hazarde surstrate mi renkontis esperantiston. Eble li estis iom erbia, en bonega humoro. Preterirante min li kantetis „Lasta rozo“... Mi alparolis lin — vere li estis esperantisto-instruisto. Ni iom interparolis kaj li daŭrigis sian vojon denove kun la „Lasta rozo“...

La adresoj de tiuj bonaj homoj, bedaŭrinde, dronis en la marĉoj de vilaĝo M. kune kun mia persona pakajo en la veturilaro de la roto.

La 10-an de marto 1945 mi estis grave vundita en la defensivaj bataloj sudoriente de Balatono. Oni revenigis min al Sofio por esti kuracata. Mi ne povis moviĝi kaj nur kuŝadis.

Pasis tago, dua... semajno, dua, tria... monato... Neniu vizitis min. La flegistinoj demandis, ĉu mi ne havas proksimulojn, kial neniu vizitas min. Kun ĉiu nova tago la soleco fariĝis ĉiam

Ilija naskiĝis je la 20 de marto 1911 en la monta vilaĝo Kalopat, Makedonio. En 1913 eksplodis la dua balkana milito kaj la dujara knabo kune kun siaj gepatroj fuĝis el Kalopat. Dum la Unua Mondmilito li loĝis en vila-



pli peza al mi. Finfine mi decidis: mi skribis poŝtkarteton al CK de BEA. Tiam okazis io, kio ege mirigis miajn kunfrontulojn en la ĉambro: ĉiumerkrede kaj dimanĉe posttagmeze, dum la horoj, kiam eksteraj homoj povis viziti la hospitalon, nia 17-a ĉambro ne povis enteni miajn novajn geamikojn-esperantistojn. Venadis studentoj, lernantoj, laboristoj, eĉ tutaj familioj, venadis al mi kiel proksimaj kaj karaj homoj. Ili kunportis librojn, dolĉaĵojn, cigaredojn (malgraŭ, ke mi ne fumis). Sed plej karaj estis la varmaj vortoj kaj atento. Mi memoras ĉiam kun

ĝeto apud urbo Ksanti, sude de Rodopi-montaro. La venkintoj en la milito — angloj kaj francoj — okupis la ĝegean terstrion kaj la familio de Ilija denove fuĝis kaj trovis hejmon en Asenovgrad. Liaj pli aĝaj fratoj subtenis lin por fini la mezgradan lernejon.

En sia dekkvinjaraĝo li fariĝis novico ĉe komerca firmao kaj iom pli malfrue eniris la vicojn de tabaklaboristoj, en kies medio li lernis la unuajn lecionojn de la klasbatalo.

En 1928 Ilija partoprenis la fondon de junlaborista societo. Baldaŭ post tio li estis varbita en la nelegala Kom-somolo. La sekvan jaron en Asenovgrad estis fondita laborista Esperanto-societo. Ilija aliĝis al la societo kaj regule vizitis la kurson de Esperanto, kiun gvidis la tabaklaboristo Atanas Pavlov. Fininte la unuagradan kurson, li aliĝis al la kurso por progresintoj kun gvidanto David Sasonov, studento. Dum ekskursoj en la montaro oni kolektive legis en Esperanto verkojn de P. Panĉ, B. Lavrenev, E. Miĥalski kaj aliaj sovetaj aŭtoroj. Ilija admiris la heroojn de la rusa revolucio kaj mem revis fariĝi simila al ili.

En la rondo de la progresemaj es-

emocio pri tiu neripetebla ĝojo, kiun ili havigis al mi per siaj vortoj. Tio estis manifestiĝo de la unueco de la esperantistoj, de ilia ĉarma amikeco.

Ankoraŭ nun mi rememoras kun varma dankemo pri Saŝo, lernanto, pri Kosta, studento, pri familio Malinov kaj multaj aliaj, kies nomojn mi jam forgesis.

Ĝis kiam mi estos viva, mi rememoros la varmecon de tiuj momentoj antaŭ 30 jaroj! Tiu varmecon estis donita al mi pro tio, ke mi laboris kaj batalis por nia patrolando Bulgario, por nia Komunista Partio, por nia kara Esperanto-lingvo kaj movado.

perantistoj li trovis adeptojn por siaj revoluciaj ideoj, havigis al ili nelegajn gazetojn. Senintence oni alkroĉis al li kromnomon „La kamarado“.

En la somero de 1929 Ilija partoprenis en la organizo de la granda striko de tabaklaboristoj. Kelkmiloj da laboristoj batalis por pli altaj tagsalajroj. Tiu striko estis serioza bato kontraŭ la faŝisma diktaturo.

En 1932 oni soldatigis lin en la artileria kazerno de Plovdiv. Tie li kaŝe disvastigis alvokojn defende al Sovetunio, kiu estis minacata per nova intervena milito fare de la imperiistoj. Spionoj ekflaris la kuraĝan amikon de la soveta popolo kaj denunciis lin. Post multtagaj teruraj torturoj oni starigis lin antaŭ milittribunalo, kiu senhezite eldiris mortverdikton. La apelacia kortumo nuligis la mortverdikton kaj post okjara restado en la malliberejoj Ilija revenis hejmen.

Senŝancele li daŭrigis sian kontraŭfaŝistan agadon. La bulgara reĝo kaj lia administracio invitis germanajn trupojn en la lando. Ilija senlace avertis la junulojn protesti kontraŭ la preparata kontraŭsoveta milito. Ĝi eksplodis baldaŭ. La faŝista ŝtato konstruis du koncentrejojn por kontraŭfaŝistoj en la montaro apud Asenovgrad. Laŭ decido de la Komunista Partio kamarado Ilija partoprenis la liberigon de la kontraŭfaŝistoj.

Post la historia venko de la Ruĝa Armeo ĉe Stalingrad (nun Volgograd) li preparis sin por armita batalo kontraŭ la perfiduloj-regantoj. Kiam en majo 1943 ekfloris la tilioj, li forlasis sian hejmon kaj aliĝis al la partizana taĉmento „Georgi Benkovski“. Poste li fariĝis vicbrigadestro de Dua Rodopa Partizana Brigado „Vasil Kolarov“.

Je la 9 de septembro 1944 la

Dum la jaroj de la Dua Mondmilito lernantoj-esperantistoj el la gimnazio de Lukovit esprimas sian kredon en la venko de la soveta popolo. Sur la antaŭa plano oni legas: „Kredu en la estonteco!“



brigado de Ilija eniris venke en Asenovgrad. Oni renversis la faŝistan potencon en la urbo kaj en la proksimaj vilaĝoj. Post tio la brigado direktis sin al Plovdiv, kie partoprenis en la popolaj manifestacioj.

Tamen la faŝista Germanio ankoraŭ mordis. En la Balkana Duoninsulo la hitleranoj murdis kaj rabis. Ilija deklaris sin volontulo kaj estis akceptita en la 21-a Infanteria Regimento. Oni enoficigis lin kiel politikan komisaroon de 3-a bataliono de la regimento. Li entuziasmigis siajn soldatojn en la batalo kontraŭ la hitleranoj kaj mem iris en la unuaj vicoj. La kvaran de oktobro ĉe urbo Kriva Palanka, Jugoslavio, en la loko Sultan-Tepe, ekflamis kruela interbatalo. Faŝista kuglo trafis lian koron.

Brava, honesta, sindona membro de la Komunista Partio, fervora esperantisto, strebanta al paco kaj amikeco inter la popoloj, tia restas en nia memoro kamarado Ilija Miĥajlov. Lin memoras kaj honoras ne nur esperantistoj. Lian nomon la civitanoj de Asenovgrad eternigis per bela monumento en la centro de la urbo; ĝin portas ankaŭ la kvartalo, en kiu li loĝis. Ilija Miĥajlov estas patrono de kelkaj laboristaj brigadoj en diversaj urbaj entreprenoj.

La esperantistoj de Asenovgrad alte taksas la meritojn de kamarado Ilija Miĥajlov kaj promesas labori ĉiam abnegacie por la prospero de nia patrulando kaj por la triumfo de Esperanto.

Atanas Gaev



FERVORA KAJ FIDELA ESPERANTO-VETERANO

El la parolado de IVAN KEREMIDČIEV-ESPEROV en la solena kunveno, dediĉita al k-do Nano Nanov

Kvara jardeko foriras, malnovaj amikoj kaj kunagantoj Esperantaj ni estas, sed apenaŭ nun — antaŭ lia 70-jariĝo — mi eksciis, ke li estas tiom aĝa. Ĉar li aspektas ĉiam pli juna ne nur laŭvizaĝe, sed ankaŭ anime.

Nia amiko Nano Nanov naskiĝis en malriĉa familio en vilaĝo Strupec, Vraca-distrikto. Jam tro juna li komencis gajni sian panon kiel kudrolaboristo. Ekkoninte la kapitalisman ekspluatadon, en 1929 li fariĝis membro de la junkomunista asocio RMS. En tiu jaro komenciĝis granda ekonomia krizo en la mondo kaj en Bulgario. Fortikiĝis kaj disvastiĝis ankaŭ la laborista movado kaj la batalo kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio. En 1931 pro sia kuraĝa kaj aktiva junulara agado Nano estis akceptita kiel membro de la Komunista Partio. Tiu-

tempe li estis teknika kunlaboranto de la Partio, respondeca pri la urboj en la distriktoj de Burgas kaj Jambol, poste — respondeca redaktoro de la partiaj eldonaĵoj „Eho“, „Juĉel“ kaj „Pogled“. Kiel multaj tiaspecaj redaktoroj ankaŭ Nano estis malliberigita por naŭ jaroj, el kiuj li pasigis en la faŝisma malliberejo 4 jarojn. Poste, pro malkovro de senleĝa „kanalo“ al USSR, kien la Partio intencis sendi lin, Nano Nanov travivis tri monatojn ankaŭ en rumana malliberejo.

Post sia liberigo nia jubileulo denove aktivis en la laborista klasbatalo. Li partoprenis fervore ankaŭ la rezistan kontraŭfaŝisman movadon en 1941—1944 kiel membro de batal- kaj sabotgrupoj en Sofio. Post la liberigo de la bulgara popolo (9 de septembro 1944) Nano partoprenis la kontraŭhit-

OMAĈE AL LA 70-JARIĜO DE NANO NANOV

Dediĉe al la 70-jariĝo de k-do Nano Nanov — ĝisnuna prezidanto de la Sofia Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“ — la 9-an de aprilo en Sofio okazis granda solena kunveno.

Pri la vivo kaj agado de la jubileulo ameparolis k-do Ivan Keremidĉiev-Esperov. Li priskribis la partoprenon de N. Nanov en la revolucia batalo de nia popolo kontraŭ la faŝismo kaj poste en la konstruado de la nova vivo en nia lando. Aparte li emfazis lian fruktodonan preskaŭ duonjarcentan Esperanto-agadon. Dum la lastaj 14 jaroj k-do Nanov estis seninterrompe prezidanto de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ — la plej granda en nia lando kaj unu el la plej grandaj tutmonde.

La jubileulo estis salutita de reprezentantoj

de multaj E-societoj kaj organizaĵoj, kiuj enmanigis al li donacojn. En la salutletero de CK de BEA, kiun legis k-do Nikola Aleksiev, oni diras: „Ellerninte la internacian lingvon Esperanto vi ankaŭ vian lingvoposedon subigis al la granda ideo pri liberigo de la popolo el la jugo de kapitalismo kaj faŝismo. Esperanton vi uzis por kontaktoj de la revolucia bulgara Esperanto-movado kun la tutmonda revolucia Esperanto-movado.“

La sekretario de E-Societo „M. Gorkij“ — M. Marinov tralegis specialan adreson al k-do Nanov, per kiu la estraro de la societo proklamis lin honora prezidanto.

Al la adresitaj al li varmaj vortoj kaj bondeziroj k-do Nanov respondis kortuŝite. Inter alie li diris: „Esperanto kaj la Esperanto-movado estas utilaj, ili servas al la interkompreniĝo kaj la amikeco de la homoj el ĉiuj nacioj. La internacia lingvo Esperanto devas ludi kaj ludas gravan rolon ankaŭ hodiaŭ por konigi eksterlande la bulgaran kulturon kaj niajn ĉiufankajn sukcesojn en la socialisma konstruado.“

La solena kunveno finiĝis per esperantlingva literatura programo.

I. Tanev

*N. Nanov respondas al la gratuloj.
La sidanto—Ivan Keremidĉiev.*



leristan liberigan militon kiel volontulo kaj akiris sovetan medalon. Post tio li eklaboris kiel inspektoro en la Interna Ministerio, kie li emeritiĝis.

Multaj estas la postenoj de sociaganto, kiujn k-do Nanov okupis kaj nun okupas: membro de partia komitato, vicprezidanto de kamarada tribunalo, propagandanto ktp. Aparte notinda estas lia multjara fidela kaj vigla por- kaj peresperanta agado.

Nano Nanov esperantiĝis en 1930 kaj tuj komencis disvastigi nian lingvon, gvidante E-kursojn. Speciale li aktiviĝis en nia Movado ekde 1936 kiel membro de la Esperanto-societo en Sofio. Tiam li partoprenis en la partia E-aktivularo kaj poste estis kunlaboranto de la E-paĝo en ĵurnalo „Zarja“. Kune kun Vasil Ĉoĉov, nun profesoro, Nanov tradukis la libron de la soveta esperantisto Ernst D: ezen „Zamenhof—ideoj kaj verkaro“, kiun oni disvastigis tra la tuta lando.

Dum la lastaj 15 jaroj nia ŝatata jubileulo estis membro de CK de BEA kaj post la fondiĝo de la Sofia Distrikta-Urba E-Komitato —certan

tempon ekde 1961 ĝia prezidanto. Ĉiuj sofiaj kaj bulgaraj esperantistoj konas lin kiel fervoran prezidanton de la plej granda bulgara societo „Maksim Gorkij“. Dank'al lia bonega gvidado la societo fariĝis unu el la plej grandaj kaj plej viglaj E-societoj en la tuta mondo.

K-do Nano Nanov partoprenis en la universalaj kongresoj de Esperanto en Budapeŝto, Vieno kaj Helsinki, en ĉiuj bulgaraj E-kongresoj, konferencoj kaj pli gravaj E-aranĝoj kaj manifestaĵoj.

Pro sia energia kaj fruktodona laboro kiel komunisto kaj esperantisto k-do Nanov estas honorita de nia Popola Respubliko per 13 ordenoj kaj medaloj. Li ricevis ankaŭ honorinsignojn kiel aganto de MEM kaj de BEA.

Lige kun la 70-jara jubileo de k-do Nano Nanov ni tutkore salutas lin, bondezirante al li longan vivon kaj sanon por havi eblecon ankoraŭ multajn jarojn labori samtiel rezulte, kiel ĝis nun, por la efektivigo de la socialismo en nia lando, por la triumfo de la Internacia Lingvo, por la paco kaj interpopola kompreniĝo.

ORGANIZA VIVO

GRANDA PORPACA KUNVENO EN ĤASKOVO

Enkadre de la Semajno de Internacia Amikeco en Ĥaskovo okazis granda solena kunveno. Ĝiaj iniciatintoj estis: La Urba Pac-komitato, la Urba Komitato de la Bulgaraj Virinoj, la Urba Komitato de la Patrolanda Fronto, la Urba Esperanto-Societo kaj aliaj sociaj kaj kulturaj organizaĵoj. En la lekciaj salonoj de la Urba Kulturdomo venis multaj civitanoj.

La kunvenon malfermis la konata esperantisto kaj sociaganto Nikola Pilev. Antaŭ la publiko ekstaris la junpionira Esperanta kantgrupo de lernejo „Lajoŝ Koŝut“, kiu prezentis belartan programon. La kantoj kaj la recitaĵoj de tiu grupo spegulis la eternan impeton de la homaro vivi, labori kaj krei valoraĵojn

en paco kaj internacia kompreniĝo. La sincera tono de la programo kaj ĝia alta nivelo kurtuŝis profunde la publikon.

S-ano Prodan Prodanov, esperantisto el Sofio, parolis je temo: „Ambasadoroj de la paco“. La parolado estis interesa vojaĝpripri-skrivo, kiu pentris antaŭ la publiko veran internacian panoramon. Vizitinte multajn landojn, k-do Prodanov rakontis pri la vivo de diversaj popoloj, kiuj luktaĵas por paco kaj nacia justeco. Li substrekis la progreseman karakteron de la bulgara E-movado kaj ties kontribuon al la konstruado de nova vivo en nia lando. Prodanov same emfazis la rolon de tiu movado por la edukado de la junaj generacioj en spirito de patriotismo kaj socialismo.

La prelego finiĝis per alvoko al ĉiuj labori sindone kaj plimultigi la materialajn kaj kulturajn valorojn de nia popolo kaj patrolando. La interesa prelego de P. Prodanov kreis tre viglan atmosferon. La sentojn de la aŭditorio esprimis en siaj eldiroj Bojdev kaj Luka Vâlcanov.

La solenaĵo finiĝis en la unuagrada restoracio „Aida“, kie la ĥaskovaj esperantistoj ce-

lebris la okmartan virinfeston de la samideaninoj el la urbo. La viva ornamo de tiu spontana festo estis niaj samideaninoj mem, kaploke kun la panjo-heroino Zlatka Elenova, edzino de la sperta E-pedagogo Miĥail Elenov. Ŝi donis vivon al ok infanoj — ĉiuj esperantistoj. La vespero pasis en dancamuzoj, ŝercoj, esperantlingvaj konversacioj.

Georgi Idakiev

MANIFESTAĴO DE ESPERANTISTOJ EN ASENOVGRAD

De la 3 ĝis la 8 de aprilo en Asenovgrad okazis printempaj ĉeestaj E-kursoj, organizitaj de la Instruista Sekcio kaj la Sofia Distrikta Komitato de BEA. La kursanoj, dividitaj en 3 grupoj laŭ sia lingva nivelo, diligente studis kaj havis grandan utilon. Ili loĝis en la bonega komunloĝejo de Meza Politeknika Lernejo „Dimităr Blagoev“. Gvidantoj de la grupoj estis Jordan Markov, Vioĉin Oljanov, Kunĉo Vâllev. Administranto — Zahari Ivanov.

Dum la libera tempo la kursanoj ekskursis al la historia Asenov-fortikaĵo apud la urbo, al la monaĥejo de Baĉkovo, al aliaj belaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo de tiu loĝloko, situanta en la piedoj de Rodopi-montaro. Ili vizitis ankaŭ la historian muzeon. Impresis ilin tio, ke la loĝantoj estas tre afablaj, helpemaj, gastamaj. Aparte ĝojiga estas la fakto, ke Esperanto havas grandan aŭtoritaton en la urbo. Evidentiĝas la rezultoj de bona multjara sindona laboro de la lokaj esperantistoj.

Tion montris ankaŭ la kunveno-renkontiĝo de esperantistoj je la 6 de aprilo. Ĝi estis dediĉita al la 30-a jubileo de la venko super

la faŝismo kaj okazis en la kulturdomo de la urbo. Ĉeestis pli ol 120 esperantistoj el Asenovgrad kaj la kursanoj, gastoj el Plovdiv, Pazarĝik kaj Smoljan. Speciale por la kunveno venis el Sofio kelkaj membroj de la Literatura E-Rondo ĉekape kun k-do Asen Grigorov — gvidanto de la Rondo kaj prezidanto de la Literatura Sekcio de BEA. Ĉeestis ankaŭ la estro de fako „Popola instruado“ kaj reprezentanto de la Urba Popola Soveto de Asenovgrad.

Pri la glora venko de Sovetunio kaj la aliaj liberamaj popoloj super la faŝismo arde parolis k-do Kunĉo Vâllev — sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Sekvis belarta programo, kiun partoprenis kursanoj, membroj de la Literatura Rondo k. a. Aparte impresis la publikon la estradaj E-kantoj de Jordanka Georgieva el Asenovgrad, akompanitaj de gitara junulara E-ensemblo el la urbo.

La tuta programo, la amika kunesto kaj dancado plezurigis ĉiujn.

Malina Kamenova

INTERNACIA ESPEPANTO-FERIO EN LA FAMA BULGARA BANURBO VELINGRAD

La Distrikta E-komitato en u. Pazarĝik kaj la Esperanto-Societo en u. Velingrad aranĝas de la 25-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro 1975 INTERNACIAN ESPEPANTO-FERION en la komforta ripozdomo de la konstrulaboristoj. La programo antaŭvidas duontagajn ekskursojn por vizito de vitkampoj, kooperativa agrikultura bieno, la baraĵlagoj Batak kaj Belmeken, la groto Sneĵanka, la sporturbo k. a.

Aliĝkotizo — 45 levoj por bulgaroj, 60 levoj por eksterlandanoj. La litoj

estas limigitaj — 50. Do, ne prokrastu vian aliĝon! Pagu laŭ konto 185/779, DSK, Esperanto-societo „Stoju Kalpazanov“, 4600, Velingrad, Bulgario.

Pliajn informojn petu je adreso: Manol Ĉolev, 4600 Velingrad, Bulgario.

Venu ĝui dum 10 tagoj pitoreskan naturon, utiligi diversspecajn kuraĉajn termalakvojn, spiri freŝan pinaron!

LA X-A JUBILEA JARKONFERENCO DE B E J

La 15—16-a de marto junaj bulgaraj esperantistoj kolektiĝis en urbo Varna por trakti la problemojn de Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ).

La tradicia interkona vespero okazis en la Junulara Domo kaj la laborkunsidoj — en la oficiala halo de la Supera Instituto de Popola Ekonomio „Dimităr Blagoev“. La konferencon malfermis la prezidanto de BEJ ing. Angel Todorov. Grandan impreson al la ĉeestantoj faris la salutparolado de docento Belčo Nikolov — merita aganto de la kulturo, prezidanto de la Komitato por Eŭropa Sekureco en u. Varna, eksrektoro de la Supera Instituto „D. Blagoev“. Esperantisto de 1921 j., k-do Nikolov rakontis al la junaj esperantistoj pri la pozitiva influo de Esperanto sur lin — por la formiĝo de lia mondkoncepto, por lia kresko kiel kultura aganto kaj pachtalanto. „Esperanto ne estas memcelo, sed rimedo, ilo por laboro kaj efiko, — diris interalie k-do Nikolov. — Dudek jarojn mi estis elmigrinto kaj mi uzis la lingvon en Eŭropo. Per Esperanto mi trovis amikojn, laboron, loĝejon. Pere da la esperantistoj mi havis eblecon en Eŭropaj landoj paroli antaŭ multaj kunvenoj pri la sanga faŝisma teroro de Cankov en 1923 jaro.“ Plue k-do B. Nikolov akcentis, ke nun la ĉefa tasko de ĉiuj progresmaj, demokratiaj organizoj en la tuta mondo estas unuigi sin en la batalo por amikeco inter la popoloj por paco sur la tero. Por ni, la bulgaraj esperantistoj, gravega tasko estas unualoke labori kaj batali por internacia kunlaborado kaj sekureco en nia kontinento. Ni devas uzi Esperanton en tiu nobla laboro kaj batalo.

En la nomo de BEJ raporton pri la agado kaj la antaŭstarantaj taskoj de la bulgara E-junularo faris k-do Georgi Miĥalkov — prezidanto de la Sofia Studenta E-Societo „Vela Peeva“. Li substrekis, ke la kresko de la ligoj de BEJ kun esperantistoj el la tuta mondo kontribuas por firmiĝo de la solidareco inter la popoloj en ilia pachtalato. Gravan rolon tiurilate ludas la internaciaj aranĝoj de BEJ. Ekz. la Internacia Junulara Arkeologia E-Brigado pasintjare sur la promontoro Kaliakra firmigis la amikecon inter junaj esperantistoj el 10 landoj. Arkeologia brigado okazos ankaŭ ĉi-jare en aŭgusto aliloke. Miĥalkov alvokis al aktivigo de la agado de BEJ en ĉiuj loĝlokoj de la lando. Kie mankas E-societo, oni fondu E-grupon ĉe la ĝenerala societo kaj agu samtempe kaj kune kun la pat-

rino-societo, kaj aparte (por specialaj junulaj taskoj kaj interesoj).

K-do Dimităr Papazov — sekretario de BEJ, parolis pri la materiala bazo de BEJ kaj tiesutiligado. Li sciigis, ke la lokaj komsomolaj organizaĵoj konsentis disponigi al la junaj esperantistoj klubejojn aŭ halojn en la junularaj domoj por okazigi tie siajn E-aranĝojn dufoje en la semajno. Tie la E-junularo povas disvolvi riĉan kaj varian agadon.

Ing. Angel Todorov substrekis la neceson plialtigi la lingvan nivelon de la E-junularo, por ke ĝi povu eltiri maksimuman utilon el la internaciaj E-aranĝoj. Nur tiam ili povus bone plenumi ankaŭ sian devon kiel patriotoj kaj internaciistoj, popularigi la kulturon kaj la sukcesojn de nia popolo en la socialisma konstruado, la belajojn de nia patrolando, kontribui por unuigo kaj formiĝo de la progresmaj kaj pacamaj fortoj en la mondo.

En la akceptita rezolucio oni emfazas la neceson dediĉi grandan atenton al preparo por la nacia Recitalo „Vazov-tagoj“ en Karlovo (12—15 de julio 1975). Tie la junaj esperantistoj devas prezenti sin per altnivelaj kaj variaj programoj.

Oni substrekis ankaŭ, ke la junularaj E-societoj kaj grupoj devas regule informadi la Estraron de BEJ pri pli gravaj aranĝoj kaj eventoj en sia vivo. Tiuj informoj estos uzataj por la neesperantista gazetaro, radio, televido, por „Bulgara Esperantisto“ k. s.

Fine, ĉe tre solenaj cirkonstancoj, la Estraro de BEJ honoris per la speciala insigno „Aktiva membro de BEJ“ kelkajn aktivulojn. Tio estos farata ankaŭ estonte. La honoritoj deklaris pretecon labori por Esperanto kun duobla energio.

Lasto Nikov

Momento el la konferenco



Legita de GEORG. MIHALKOV

Tio, kio estas atingita ĝis nun, ne povas kaj ne devas kontentigi nin. Estas necese doni novan impulson al nia ideo-eduka kaj kulturkleriga laboro. Nun nia agado devas pli trafe respondi al la postuloj, kiujn starigas la hodiaŭa stadio de la disvolvo de nia lando, ĝi devas esti ligata pli intime kun la taskoj pri konstruado de matura socialisma socio.

La internaciisma sento, karakteriza por ĉiu bulgura esperantisto, evoluos kaj plifortiĝos surbaze de amikeco kaj unueco kun la esperantistoj de Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj landoj kaj ni, la junaj esperantistoj, donos propran kontribuon por efektivigo de integriĝo en ĉiuj regionoj de la vivo de niaj frataj landoj. Tiu sento devas manifestiĝi ankaŭ rilate al ĉiuj sferoj en la batalo por paco kaj interkompreniĝo sur la tero — kontraŭ tiuj, kiuj klopodas detrui la pacan vivon de la homoj. La kulturkleriga kaj ideo-eduka laboro de ĉiuj asociaj unuoj devas esti direktata al pli da prelegoj, recitaloj, solenaĵoj, ekskursoj, interurbaj kaj interdistriktaĵoj E-renkontiĝoj ktp.

La studentaj kaj junularaj societoj tute ne eĉerpiĝis siajn eblecojn tiurilate, sed estas necese, ke ili variigu siajn agadformojn.

La historio de la bulgara E-movado abundas je ekzemploj de fidela servo al la popolo. Tial ĝia studado kaj pli speciale la studado de la E-agado en la pasinteco de nia naskiĝloko estas neelĉerpebla fonto por alta ideo edukado de la esperantistoj. La internacia korespondado devas helpi la junajn bulgarajn esperantistojn ne nur esprimi siajn personajn pensojn kaj sentojn, sed ankaŭ krei amikajn ligojn kun eksterlandanoj, gajni novajn amikojn kaj konatigi al ili la atingiĝojn kaj la belajojn de nia patrolando, la kulturajn valo-

raĵojn de la bulgara popolo, kreitajn kaj kon-servitajn dum jarcentoj.

Estus tre utile esplori serioze la motivojn, kiuj igas la studentojn kaj junulojn studi la Internacian Lingvon. Tio estas problemo grava kaj tre interesa de sociologia vidpunkto. La rezultojn de similaj studoj ni utiligos en nia estonta laboro por altiri novajn membrojn en nian Movadon. Nun ni devas kunigi la agrablajn momentojn en nia vivo kaj agado kun pli celdirekta scienca agado. En niaj vicoj estas inĝenieroj, matematikistoj, historiistoj, artistoj, pentristoj. Nia Movado devas subteni iliajn talentojn kaj ilian deziron pri scienca kaj kultura manifestiĝo, ties realigon sur pli vasta internacia fronto. Ni devas organizi aktivan interŝanĝon de praktikaj spertoj, de sciencetnikaj konoj, de kulturaj kaj artaj aktivecoj kun la studentoj el diversaj landoj pere de nia bonega kontaktilo — la internacia lingvo Esperanto. Estas tre interesa la problemo de la originala literaturo en Esperanto. Pri ĝi devas pensi E-poetoj kaj verkistoj, ĵurnalistoj kaj filologoj, kies nombro en niaj vicoj same ne estas malgranda. La internaciaj Esperantaj gazetoj atendas niajn materialojn — belartajn kaj sciencajn.

Tiuj ĉi kaj ankoraŭ multaj aliaj problemoj atendas la sciamon, la energion, la talentojn. La tuta ideo-eduka laboro de BEJ devas esti efika faktoro por plialtigo de la konscienco de la junaj bulgaraj esperantistoj, por formiĝo de socie aktivaj, morale stabilaj kaj ideo konvinkitaj homoj, kiuj kun pura koro kaj hela animo kiel Ĥristo Botev amu sian patrolandon, kiel Georgi Dimitrov laboru por ĝia socialisma supreniro.

TRIDEK PACAJ JAROJ EN MIA VILAĜO

La Dua Mondmilito rapide iris al sia fino. Post longa varma kaj sanga batalado la progresemaĵoj fortoj en nia lando renversis la malamatan monarkofaŝismon. Ekestis favoraj kondiĉoj por rapida ekonomia kaj kultura supreniro. Ĉie ekflamis impeta entuziasmo.

Ekboldis nova vivo ankaŭ en mia vilaĝo Râjevo Konare, distrikto de Plovdiv. En marto de 1945 cent kvindek tri familioj fondis agrikulturan kooperativon. La vilaĝanoj kredis, ke ili savos sin el malriĉeco kaj suferoj, ke ilia vivo pliboniĝos.

Dum la unuaj jaroj estis multaj malfacilaĵoj, bremsoj, obstakloj. Mankis organiza sperto, mankis monrimedoj (ja la unuaj kooperativanoj estis homoj malriĉaj). La saman

jaron la agrikulturaĵojn trafis nevidita ĝis tiam sekeco. Tamen la unuigitaj fortoj de la vilaĝanoj, gvidataj de la Komunista Partio, sukcesis venki ĝin.

La rezultoj, atingitaj dum la tridekjara paca kaj obstina laboro, pravigis la esperojn. Sukcesoj post sukcesoj, nekalkulebla prospero sekvis.

La malfacila manlaboro de la kamparanoj malaperis. Grandaj maŝinoj anstataŭigis ĝin. Traktoroj bruas en la senlimaj agrokampoj kaj plugas, erpas, fosas. Aviadiloj semas kaj sterkas la plantaĵojn, maŝinoj akvumas la teron. Potencaj gren- kaj rizkombajnoj kolektas la abundan rikolton.

La produktaĵo de unu hektaro kvarobligis,



TRA LA E★ MONDO

ESPERANTO-AKTIVECOJ EN SOVETUNIO

La virinjaro kaj Esperanto

9. III. 1975. Dediĉe al la Internacia Virina Tago kaj la Internacia Jaro de la Virino en Moskva Internacia Esperanto-Klubo (MIEK) okazis kunveno, en kiu konvenan prelegon faris la instruistino E. P. Popova. Ŝi rakontis pri la aktiva partopreno de la virinoj en la E-movado kaj pri la grava rolo de la virinoj en ĉiuj fakoj de nia vivo. Popova menciis la renovigon de la laboro de la speciala Virina Sekcio ĉe la Esperanto-Komisiono de SSOD sub la gvido de L. V. Erjuĥina.

Geografio kaj Esperanto

10. III. 75. En la Moskva Geografia Societo estis lekcio pri la neceso de internacia lingvo por la geografoj. La lecion tralegis la malnova esperantisto profesoro de geografio D. L. Armand. Li interese montris, ke Esperanto estas la plej taŭga lingvo kaj ĝi jam estas uzata en multaj landoj. Tion pruvis ankaŭ la ekspozicio de geografiaj esperantlingvaj priskriboj, prospektoj kaj gvidlibroj, aranĝita en la vestiblo de la Geografia Societo pri multaj landoj kaj kontinentoj.

La lekcio havis grandan sukceson, kaj la ekspozicio vekis multan intereson. Granda parto el la ĉeestantoj (pli ol 100 personoj) enskribiĝis por organizota E-kurso.

Interlingvistiko

12. III. 75. En la Lingvosciencia Instituto de la Akademio de Sciencoj de USSR okazis vica kunsido de la Interlingvistika Sekcio kaj de la problema grupo por internacia lingvo. Interesan prelegon pri la nuna stato de la in-

terlingvistikaj problemoj faris S. N. Kuznecov. Li akcentis, ke ĉefan rolon en la aktuala problemaro de la interlingvistiko havas nun Esperanto. La ceteraj pretendantoj (Ido, Interlingua, Okcidental k. a.) havas nur helpan rolon. Iliajn taŭgajn kaj utilajn elementojn oni povas nur adopti en Esperanto.

Lige kun la prelego okazis vigla kaj longa diskutado, kiun partoprenis la moskvaj lingvistoj Danovskij N. F., Tokarev B. V., Ivanov I. A., Grigorjev V. P., Isaev M. I.

La vivkondiĉoj en la vilaĝo estas preskaŭ egalaj al la urbaj. La domoj estas moderne meblitaj kaj ekipitaj, preskaŭ en ĉiuj domoj estas televidiloj, lavmaŝinoj, fridujoj k. t. p. Ankaŭ la nombro de la aŭtoj estas granda. La vilaĝanoj, kiuj iam jungis bovon kaj azenon, nun veturas per aŭto.

Nia vilaĝo jam similas al bone aranĝita urbeto.

Esperanto en Siberio

16. III. 75. En MIEK N. N. Matvejev-Bodrij rakontis pri la historio de la E-movado en Siberio kaj Malproksima Oriento dum pasintaj jaroj, kies atestanto li estis. Matvejev loĝis en Vladivostoko kaj aliaj lokoj dum la streĉaj jaroj post la Granda Oktobra Revolucio.

Ĉeestis la kunvenon L. Petrovskij, gasto el Bidgoszcz (Pollando). Li rakontis pri la E-movado en sia gepatra urbo, kie aktive laboras pli ol 100 gesamideanoj; en la loka nacia gazeto ĉiam aperas „Esperanta angulo“.

Grava konferenco de sovetaĵ esperantistoj

21. III. 75. La Esperanto-Komisiono de SSOD aranĝis E-konferencon en la Domo de Amikeco, dum kiu la prezidanto de la Komisiono d-ro de filologio M. I. Isaev faris sumigan raporton pri la sukcesoj kaj mankoj de la 6-jara agado. Sur la postenon sekretario de la E-komisiono estis konfirmita Anatolo Bereza.

La konferencon ĉeestis la estrino de la kulturfako de SSOD k-dino G. A. Kolobova. Ŝi laŭdis la laboron de la E-komisiono kaj enmanigis al 12 plej aktivaj gesamideanoj aprobajn atestojn de SSOD.

Je la fino de la konferenco estis akceptita rezolucio pri la plua laboro de la E-Komisiono.

La Internacia Tago de la Teatro

23. III. 75. En MIEK okazis vespero, dediĉita al la Internacia Tago de la Teatro. Interesan priokazan prelegon faris la emerita artisto F. F. Staneŝnikov. Post la prelego artistoj el la Centra Domo de l'Aktoro montris al la ĉeestan-

inĝenieroj k. a. — superas 200.

La vilaĝanoj, kiuj iam jungis bovon kaj azenon, nun veturas per aŭto.

Nia vilaĝo jam similas al bone aranĝita urbeto.

Stefan Dargonov

oj du fragmentojn el la teatraĵo de fratoj Tur „Ekstrema ambasadoro“. Poste oni aŭdis kelkajn muzikaĵojn kaj kantojn en la plenumo de samideaninoj V. Osipova, G. Staneŝnikova, T. Vorobjova k. a. Ĉiuj programeroj estis multe aplaŭdataj de la ĉeestantoj.

Pri la E-lernolibroj

30. III.75. En MIEK okazis metodika seminario je temo „Novaj lernolibroj kaj helplibroj de Esperanto por rusoj“. Eruditajn raportojn je tiu temo kun historia aspekto de la problemoj faris la lingvisto S. N. Kuznecov.

Komencante de la unua lernolibro de d-ro Zamenhof kaj menciinte la popularan lernolibron de Cart kaj Panier (kies ekzemplero estas en la persona biblioteko de V. I. Lenin), Kuznecov detale pritraktis la plej disvastigitajn en la 20—30-aj jaroj E-lernolibrojn de Svistunov kaj Rubljov. Specialan atenton meritas la nuntempaj E-lernolibroj de A. A. Kerner kaj de B. G. Kolker. La problemoj pri la efika metodo de E-instruado elvokis viglan diskuton, kiun partoprenis k-doĵ Ĥarĵkovskij, Zisman, Kulagin, Danovskij, Tokarev, Krajnov kaj Graĉeva.

Fine de la kunveno estis anoncote, ke la XVI Baltlanda Esperanto-Tendaro (BET) okazos ĉi-jare de la 25 de julio ĝis la 3 de aŭgusto

en la loko Helme (Estonio) apud urboj Valga kaj Tirva. En la tendaro oni intencas pridiskuti la problemojn: Esperanto kaj la naturo; Esperanto kaj la pedagogio; pacdefendo, internacia malstreĉiĝo kaj sendanĝereco. Organizanto — la Tallina Esperanto-Klubo.

Teodoro KULAGIN

OMAGE AL LA INTERNACIA JARO DE LA VIRINO EN LATVIO

Je la 6 de aprilo la E-Klubo „Internacia Amikeco“ en Riga organizis kunvenon omaĝe al la „Internacia Jaro de la Virino“. La solenan malfermon fare de s-ano Ed. Launvalks sekvis referaĵo de Ljudmila Jevsejeva. En la dua parto de la programo — varia koncerto: ĥorkantoj, deklamaĵoj, pian-numeroj, solkantoj, akordiono, ensemblo de muzikistoj ktp. En la publiko ĉeestis organizite gelernantoj kun siaj pedagogoj.

La urba vojaĝagentejo en Kuopio propriniciate preparis tute novan koloran vojaĝbroŝuron en Esperanto pri la urbo. Nepre petu ĝin senpage tuj ĉe: Urba Turista Oficejo, Haapaniemenkatu 17, SE-70100 Kuopio 10, Finnlando.

LINGVAJ DEMANDOJ

INTERLINGVISTIKA UTOPIISMO

*de prof. d-ro STOJAN ĜUĜEV — membro de la Akademio de Esperanto
Daŭrigo de n-ro 3—4)*

Unuflanke, la halucina strebado al „perfekta planlingvo“ prokrastas la kreon de tia lingvo al nedefinita estonteco, aliflanke, la konstanta reformado de la jam ekzistanta lingvo kreas ĉe la ekstera publiko — kaj ĉe ĝiaj adeptoj mem — la konvinkon, ke tiu ĉi lingvo ankoraŭ ne havas realan ekzistadon kaj ke ĝi ne estas lingvo en vera senco de tiu ĉi vorto, sed ke ĝi estas nur projekto, nur eksperimento, propono kiel ĉiuj aliaj centoj da lingvoprojektoj. Neniu konsentos lerni kaj uzi lingvoprojekton, kiu ne havas stabilecon, sed konstante ŝanĝiĝas.

La slogano „unue maksimuma perfekteco, poste la disvastigo“ kondukas do al konstanta, senĉesa prokrastado

de la klopodoj, de la batalo por la mondlingvo. La nuntempaj „gramatikistoj“ — doktoroj, scienculoj, interlingvistoj, institutoj ktp. — senfrukte diskutadas kaj cerbumadas pri la perfekteco de la lingvoprojektoj, ĉiam prokrastante la decidon kaj eĉ ne konjektante kiom da valora tempo ili perdis al la popoloj, precipe al la laborista klaso.

Por montri la ĝenajn konsekvencojn de la citita slogano („unue la perfekteco, poste la disvastigo“), mi ilustras mian penson per kelkaj ekzemploj.

En la jaro, kiam forpasis d-ro Zamenhof, t. e. antaŭ la finkonstruo de la transsiberia fervojo (1917), oni ankoraŭ bezonis 45 tagojn (1080 horojn) por ve-



turi de Moskvo ĝis Vladivostoko. Hodiaŭ per aviadilo „Tu-140“ oni bezonas por la sama distanco proksimume 10 horojn, t. e. la centonon de tiu ĉi daŭro (centoble malpli longan tempon). Ni ne parolu pri la telekomunikado fadena aŭ senfadena, al kiu sufiĉas nur kelkaj minutoj por transsendi pere de elektromagnetaj ondoj informon trans 9000 kilometroj.

En la romantika vivo de la pasinteco la tempo estis la plej malkara komercaĵo, la plej malkonsiderata varo. Sed en la lasta kvarono de la XX jc. ĝi neimageble rapide plialtigis sian valoron kaj en proksima estonteco ĝi farigos la plej multekosta artiklo de la monda ekonomio. Neniu varo, neniu valorpapero ĝuis tian altan kaj tian rapidan plivaloriĝon, kian atingis la artiklo „tempo“ dum la lastaj kalkaj jardekoj.

Nu, en tiu ĉi eksterordinara epoko, kiam la spaco kvazaŭ fandiĝas, malaperas, kaj la kapturna rapideco de la komunikado minacas neniigi la distancojn, ĉiu sekundo estas altvalora trezoro — kaj la popoloj, la tutmonda laboristaro, la progresema homaro ne povas, ne rajtas plu malŝpari jardekoin kaj eble jarcentojn en vanaj diskutadoj pri la kvalitoj de ankoraŭ neekzistantaj lingvoprojektoj kaj en atendado de la estonta „ideala“ aŭ „maksimume perfekta“ skemo de internacia lingvo. Perdo de unu jaro da atendado en la konjunkturo de 1975 egalvaloras perdon de cent jaroj da atendado en la konjunkturo de 1917. Pro la geomrtrie progresia kreskado kaj intensiĝo de la ĉiuspecaj komunikadoj, hodiaŭ la bezono de internacia lingvo por la progresema homaro estas centoble pli urĝa ol hieraŭ, kaj morgaŭ ĝi estos centoble pli urĝa ol hodiaŭ. Ĉe tiaj cirkonstancoj la novaj homoj ne havas superfluan tempon por atendi la kavadon kaj elprovadi la taŭgecon de ĉiam pli kaj pli novaj, ĉiam pli kaj pli perfektigitaj skemoj kaj projektoj de internaciaj lingvoj. Anstataŭ postkuri aprio-

rajn teoriojn kaj maksimalismajn ĥime-rojn pri ekstrema perfekteco, la ordinaraĵ homoj, apogante sin sur sia komuna saĝo, kontentigis per pli modestaj, sed pli realaj postuloj. Dum la „gramatikistoj“ — la doktoroj kaj la fariseoj de la lingvistiko — senĉese cerbumadas kaj diskutadas, kaj la „proceso“ ne havas ŝancon esti baldaŭ solvita, la ordinaraĵ homoj decidis adopti ne ian „maksimume perfektan“, ne ian „ideale belsonan“, ne ian „absolute racian“ matematikan lingvon, sed relative perfektan, relative belsonan kaj kontentige precizan, logikan, vivantan lingvon, lasante al la uzado al la socia organismo kaj al la vivo mem la taskon elprovi kaj senĉese perfektigadi ĝin. Ili do spontane substituis la eksperimentadon kaj flankenlasas la cerbumadon, rezonadon kaj aprioran argumentadon.

Tian metodon sekvis Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj ĉiuj adeptoj de la internacia lingvo Esperanto. Kaj tiu ĉi metodo estas la vera kaŭzo de ĝia sukceso — kaŭzo, kiun Svadost nomas „feliĉa kunkuro de la cirkonstancoj“.

Utopiismo kaj realismo en la interlingvistiko

Kiu do estas utopiisto? Cu tiu, kiu entreprenas solvi la problemon de lingvo internacia *hic et nunc*, t. e. *senprokraste*, kaj kiu tuj komencas la eksperimentadon, akceptante ian kompromisan decidon favore al iu jam disponebla, certe ne ankoraŭ ideale finlaborita, nek maksimume perfekta, sed *relative* perfekta kaj relative taŭga, kontentiga modelo de internacia lingvo kaj donante al ĝiaj adeptoj la eblecon pliperfektigi ĝin dum la proceso mem de la uzado? Aŭ tiu, kiu nur cerbumas kaj diskutas apriora pri la necesa perfekteco de ia ankoraŭ ne disponebla ideala modelo, kiu devus elmergi subite, en sia definitiva formo, el la cerbo de ia genia lingvisto, simile al

Atena Palasa, ŝprucinta kun sia komplete armilaro el la kapo de Zeŭso? Kiu estas pli proksime al la realeco: ĉu tiu, kiu asertas, ke oni devas ekde nun batali por la disvastigo de la ĝis nun plej sukcesinta el ĉiuj lingvoprojektoj, aŭ tiu, kiu konsilas *atendi* ĝis la elkoviĝo de la plej perfekta, ideala modelo de lingvo internacia?

Entrepreni la eksperimentadon per modeste perfekta, sed tamen disponebla, *real*a, t. e. jam kreita kaj elprovita dum okdekjara ekzistado, en kvindek naŭ universalaj kongresoj ktp. *vivanta* modelo de lingvo internacia, atesti ĝian viveblecon kaj taŭgecon per ĝia ĉiam pli profunda penetrigo en la ĉiutagan vivon, ebligi ĝian ĉiam pli grandan, pli altan perfektigon kaj evoluigon per la ĉiam kreskanta uzado kaj praktikado fare de unu ĉiam kreskanta socia organismo („popolo“) — tion ĉi mi nomas „interlingvistika realismo“.

Atendi senrezulte la kreon de ia „perfekta“, „ideala“, „senriproĉa“ ktp. lingvoprojekto, batali donkijote por ia ankoraŭ nedisponiblebla, nekreita, t. e. nereala, transcenda aŭ pure „imaginara“ (en matematika senco) modelo de lingvo internacia, sen socia bazo (sen parolanta popolo), — lingvo nek eksperimentita — kaj precipe provi trudi tian neelprovititan modelon al la tuta homaro per dekreto aŭ per la aŭtoritato de iu nacia aŭ internacia instanco aŭ per la financa subteno de privata kapitalo — jen kion mi nomas „interlingvistika utopiismo“.

Nia ĉiutaga sperto montras, ke ideala, absoluta perfekteco ne ekzistas tie ĉi sur la tero, same kiel ne ekzistas absoluta belo, absoluta justo kaj absoluta vero. Eble tiaj kategorioj ekzistas en la mondo de la ideoj de Platono. . . Sed serĉi absolutan, idealan perfekte-

con sur la tero, kaj speciale serĉi idealan, absolute perfektan lingvon, t. e. serĉi definitivon solvon de la problemo pri internacia lingvo — tio ĉi estas vera, naiva utopiismo. Tia lingvistika utopiismo kondukas al danĝeraj himeroj.

Ekzistas tamen relativa, reala, kompara perfekteco kaj relative kompare pli-malpli perfektaj, pli-malpli belsonaj, pli-malpli riĉaj, pli-malpli precizaj lingvoj aŭ lingvoj strebantaj al relativa perfekteco — kaj al tia perfekteco strebas ankaŭ Esperanto. Sed eĉ tia perfekteco ne estas atingebla en unu momento. La relative perfektaj lingvoj, kiel la relative perfektaj organismoj, atingas tiun staton iom post iom per konstanta kaj laŭgrada transformiĝado. La lingvoj ne naskiĝas perfektaj. Ili *estiĝas* perfektaj laŭ la vojo de la evoluo. Ilia definitiva formo, atingebla nur paŝon post paŝo, disvolviĝas kaj kreiĝas en la proceso mem de ilia funkciado. La bezonoj de la interkomunikado, la konstanta uzado, la vivo mem perfektigas ilin. Tiun ĉi lezon defendas ankaŭ Edmond Privat:

„La esprimbezonoj de la homa animo ne ŝanĝiĝas laŭ la ilo uzata. Ili restas konstante samaj kaj kreskas kun la kulturo. Estis do multe pli racie supozi, ke tiuj bezonoj nepre devigis donitajn rimedojn (t. e. lingvojn, St. Ĝ.) altiĝi al plena kontentigo de siaj postuloj“ (Esprimo de sentoj en Esperanto, p. 7). Do, ne la lingvistoj — la vivo mem kreas la lingvon kaj perfektigas ĝin. Kaj la rolo de la socia organismo — de la „popolo“ — en la genezo de la lingvo neniel devas esti subtaksata. Sed tiu ĉi problemaro enkondukas nin en la aferon de la socio-lingvistiko.

(Sekvas)

Samideanoj, dum la belaj someraj tagoj partoprenu amase en Esperanto-kursoj, tendaroj, ekskursoj, renkontiĝoj — regionaj, naciaj, internaciaj!



Mallonga frazo, precipe slogano, havas la avantaĝon, ke per kelkaj vortoj aŭ eĉ per unu vorto oni povas esprimi gravajn ideojn. Tamen ĝi havas ankaŭ malbonan flankon, ĉar ĉiu povas al ĝi aldoni siajn individuajn pensojn laŭ sia anticipa konvinkigo, mondkoncepto, edukiteco, imago, konscio.

R. Grinșpan en „Bulgara Esperantisto“ n-ro 10—11 (1974) proponas ŝanĝi la sloganon, menciitan en la titolo, per „Amikeco trans limojn“. Pensante, ke „trans“ signas movon kaj la amikeco devas *iri* en alian flankon de la landlimoj, la proponinto postulas ĉi tie uzi akuzativon.

Tamen ĉi-maniere estas ŝanĝata ne nur la formo, kiel pensas la proponinto, sed ankaŭ la senco de la slogano.

Por pli facile kompreni tion, ni prenu simplan ekzemplon el „Fundamenta ekzercaro“ de Zamenhof:

La hirundo fugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj.

Analoge la slogano „Amikeco trans limojn“ elvokas la komprenon, ke amikeco nur *transpaŝu* („transflugu“) limojn. „Amikeco trans limoj“ esprimas la deziron, ke ĝi *estu* („sin trovu“). *floru*, *disvastiĝu* en la alia (la transa) flanko de niaj landlimoj, t. e. en najbaraj landoj. Ĉar la slogano koncernas ne nur nin, sed ankaŭ la najbarojn, eĉ *ĉiujn* homojn en *ĉiuj* landoj, tial ilia amikeco devas flori ankaŭ trans iliaj, do — en ambaŭ flankoj de ĉiuj limoj, t. e. en la tuta mondo.

Tia estas la „filozofia“ aŭ logika aspekto de la demando.

Analizante la demandon laŭ gramatika aspekto, ni devas memori, ke neniu prepozicio en Esperanto postulas akuzativon. Laŭ „Lingvaj respondoj“ de L. Zamenhof akuzativo estas uzata nur en tri okazoj — por montri: 1) suferanton de faro; 2) direkton kaj 3) por anstataŭi la prepozicion „je“. Nenio

alia estas trovebla ankaŭ en la disponeblaj al mi gramatikoj de Esperanto. La aŭtoro de la propono eltrovis novan motivon por akuzativo, nome „moralan movon“ (!).

Ĉar fakte la afero tuŝas ĉi tie akuzativon de direkto, ni atentu, ke Zamenhof (loko citita) diferencigas prepoziciojn direktajn (ekz. „al“) kaj sendirektajn (ekz. „en“, „sur“, „tra“). Post direktaj prepozicioj oni ĉiam uzas nominativon, ĉar direkton montras la prepozicio mem. Post sendirektaj prepozicioj ni laŭbezzone uzas nominativon aŭ akuzativon, ekz. *iri en ĉambro* kaj *iri en ĉambron*. Plue ni legas en Respondo 27:

„Estas vero, ke dum la diferenco inter „en“ direkta kaj „en“ sendirekta estas tre granda, la diferenco inter „tra“ direkta kaj sendirekta esas tiel malgranda, ke en la plejmulto de okazoj ni povas egale bone uzi la nominativon, kiel la akuzativon.“

Eldiron pri „trans“ ni ne trovas en „Lingvaj respondoj“, tamen ĝia pozicio estas analoga al „tra“.

Ni ankoraŭ tralegu la specialan ĉapitron pri la akuzativo en „Lingvaj respondoj“:

„Tuŝante la akuzativon mi povas al vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie vi vidas, ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon — **uzu ĉiam la nominativon**. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara; sed ĝia uzado en okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono.“

Do, la propono ŝanĝi la jam kutiman sloganon „Amikeco trans limoj“ je „Amikeco trans limojn“ havas nek logikan, nek lingvistikan bazon.

Des pli malakceptindaj estas la aliaj sloganoj, proponitaj de R. Grinșpan:

„Amikeco tra limoj“, „Amikecon tra limoj“, per kiuj la aŭtoro eĉ pli manifeste esprimas sian zorgon nur pri trapaŝo de limoj. Ĉi tie trudas sin subkomprenata senco, ke ni kvazaŭ deziras *puŝi* amikecon tra limoj, *forigi*,

eksporti ĝin, ke ĝi al ni mem jam ne estas necesa. Se tiel faros ankaŭ niaj najbaroj, la amikeco estos konstante movigata *tra aŭ trans* limojn, en la landoj mem ĝin ni jam ne renkontos.

A. VAITILAVIČIUS (Litova SSR)

ĈU VI VOLAS VIZITI POLLANDON KAJ HUNGARION?

LA DISTRIKTA ESPERANTO-KOMITATO EN SMOLJAN HELPOS VIN!

En Pollando:

27. 7. — 9. 8. 1975 — INOWROCLAW

Internaciaj Junularaj E-Ferioj

Temo: E-agado inter mezlernejanoj — Seminario de TEJO, E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

Organizantoj: Pola E-Junularo kaj „JUVENTUR“.

Prezo: 1200 zlotoj aŭ 40 usonaj dolaroj.

3 — 9. 8. 1975 — INOWROCLAW

Konferenco de Monda Turismo kaj Seminario de UEA

Temo: Esperanto en turismo — perspektivoj ĝis 1980 j.

Organizantoj: UEA, MT kaj „JUVENTUR“.

Prezo: 750 zlotoj aŭ 25 dolaroj. Post la 60-a UK de Esperanto en Kopenhago okazos karavanvojaĝo al Inowroclaw.

3 — 9. 8. 1975 — INOWROCLAW

Seminario de TEJO

Temo: E-agado inter mezlernejanoj
Organizantoj: TEJO, PEJ kaj „JUVENTUR“

Prezo: 750 zlotoj aŭ 25 us. dolaroj
Pola adreso por ĉiuj aranĝoj: Pollando, PL-85-067, Bydgoszcz, str. Jagiellonska 12.

En Hungario:

18 — 23. 8. 1975 — BUDAPEST

4-a Varia Esperanto-Semajno (VIS)

Temo: persipa rondvojaĝo

Organizantoj: Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA

Prezo: 900—1500 forintoj

28. 12. 1975 — 2. 1. 1976 — BUDAPEST

5-a Vintra Esperantista Feriado (VEF)

Organizanto: Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA

Prezo: A-kategorio — 1200 forintoj, B-kat. — 1000 forintoj.

Aliĝo — ĝis la 15. XI. 1975.

Adreso de ambaŭ aranĝoj: Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA, Budapest VIII, Kenyermező u. 6, Hungario.

Vi povas aliĝi al la supraj aranĝoj en Pollando kaj Hungario pere de la DISTRIKTA ESPERANTO-KOMITATO, SMOLJAN, P. K. 30, BULGARIO

VERDAJ STELETOJ

LA RABISTOJ

Estis la lasta jaro de la Dua Mondmilito. SS-oficiro eniras kupeon de la rapida vagonaro Paris—Strassburg, kie sidas sola vojaĝanto, kaj salutas laŭte:

— Heil Hitler!

La alia levas sian kapon de la libro, kiun

li legas, kaj respondas france:

— Bon jour, monsieur!

„Damnita aĉulo!“ — murmuris la oficiro ĵetante al li malican rigardon. Sed kion vidas la mirigitaj okuloj de la militisto? — La franco legas libron de Schiller (Siler) en germana



lingvo. . . „Do, germanan lingvon li komprenas, sed la germanan saluton li ne estimas“ — kiel fulmo trakuras en lia kapo. Post mallonga pripenso li alparolas la francon:

— Diru al mi, ĉu nia germana verkisto Schiller pli plaĉas al vi ol nia germana saluto?

— Kial germana verkisto? Schiller estas internacia verkisto, — respondas la franco. Kaj vidante la mirigitan mienon de la alia, li daŭrigas: — Pardonu, sed por kiuj estas verkitaj liaj dramoj? Por la aŭstroj li verkis „Wallenstein“, por la svisoj — „Wilhelm Tell“, por la italoj — „La fianĉino de Messina“, por la

Romano Grinșpan

Taŝkento — USSR

francoj — „La junulino de Orlean“, por la hispanoj — „Don Karlos“, por la rusoj — „Demetrius“.

La vizaĝo de la SS-oficiro iĝas pli kaj pli longa, dum li aŭskultas la nombradon de la Schiller-verkoj. Fine li diras:

— Tamen vi ne volas aserti, ke Schiller nenion verkis por ni, la germanoj?

La franco ekridetas kompate kaj respondas:

— Kompreneble, li verkis dramon ankaŭ por vi — „La rabistoj“!

El la germana: Marin Băcev

SEN KOMPLIKO, SEN KOLIKO ESPERANTA GRAMATIKO

1. Substantivo

Tiaj vortoj, kiel homo,
skribo, ribo, pomo, domo,
neĝo, seĝo, leĝo, vivo —
portas nomon substantivo.
Do memoru — tio gravas! —
ke finaĵon „o“ ĝi havas.
Sed en fino de la vorto
o-vokalon povas morto
trafi en la poezi' —
tio estas elizi'.

Signas ĝin — sen katastrof' —
supra komo: apostrof'.
Se „j“ sekvas o-vokalon,
ĝi signifas la pluralon.
Jen ekzemploj: tri infanoj,
viroj sep, dek vilaĝanoj,
pluraj libroj,
kelkaj tigroj,
multaj kantoj,
mil lernantoj.

INTERNACIA KOMERCA EKONOMIKA VORTARO

en 9 lingvoj

ENGLISH: Intrnational Business Dictionary in 9 languages.

Formato 15×21. 5 sm., bindita, 550 paĝoj. Eldonis Klawer, Nederlando.

Prezo: 65 gld; por membroj de Esperanto-Asocioj — 57. 50 gld.

Ĉi tiu fakvortaro, tute unika, kontentigas grandan bezonon. Dank'al ĝi la komerca kaj ekonomika terminologio en Esperanto nun estas normigita. Inda kontribuo al la jam plenkreska internacia lingvo!

La vortaro estas frukto de pli ol naŭjara internacia kunlaborado. Ĝin projektis, kompilis kaj redaktis F. Muniksma (Nederlando) sub aŭspicio de Instituto por Esperanto en Komerc kaj Industrio (EKI) — Nederlando.

Ĉi tiu vortaro enhavas specifan terminologion de organizado kaj tekniko de la komerc, ekonomiko kaj sociala ekonomiko. Granda nombro de la enmetitaj terminoj ne troviĝas en gene-

ralaj, multaj eĉ ne en ĉiuj specialaj vortaroj. Ŝajne simplaj terminoj, kiel pensio, salajro, ferioj, striko k. s., ermetiĝis pro sia social-ekonomika signifo.

Aldonita estas listo kun la nomoj de ĉirkaŭ 200 landoj kun ties valutoj, same en la diversaj lingvoj.

La vortaro estas naŭlingva. La anglaj terminoj estas en alfabeto sinsekvo kaj per faciluza sistemo de 8 indeksoj la libro estas alirebla el ĉiu de la aliaj enmetitaj lingvoj.

Elstara eco de la vortaro estas, ke ĝi enhavas la difinon aŭ klarigon en Esperanto kaj la angla de ĉiu termino, tiel ke la verko samtempe estas

Redakta Komitato: Kunĉo VÁLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krăstju KARUCIN Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Korektis: M. Conkovski

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29



DANCTRINKEJO „VAR.ETE“

Por pasigi agrablajn horojn de amuzo, vizitu danctrinkejon „Variete“ — la plej renomitan tiaspecan ejon en Bulgario. Ĉi troviĝas en la suda parto de la fama ripoz-komplekso „Slânchev Brjag“, je 100 metroj de la nigramara bordo. Aparte alloga ĝin faras ĝia impona eksteraĵo — la konstruaĵo havas formon de asterio.

La altnivela varietea programo kun

partopreno de bulgaraj kaj eksterlandaj famaj artistoj amuzos vin en daŭro de horoj, post kio sub la sonoj de orkestro vi dancos. La varieteco de trinkaĵoj proponataj kontentigos eĉ plej delikatan guston.

Danctrinkejo „Variete“ atendas vin ĉiujespere de la 22 ĝis la 4 horo. Informoj kaj rezervigoj: SLÂNĈEV BRJAG“, tel. 23-41.

lernolibro.

La vortaro kreiĝis tute pere de la Internacia Lingvo. Ekzemple, la difinoj kompiliĝis en Esperanto kaj poste tradukiĝis en la anglan.

Resume, temas pri tre grava kaj urĝe bezonata verko, necesa por oficejoj en komerco kaj industrio en vasta senco, por la ŝipmakleristo, ŝipveturiga entrepreno, servodona entrepreno kun eksterlandaj rilatoj, studanto, la sindikata movado kaj por la ekono-

mikisto, kiu ĉe siaj studado kaj laboro devas legi eksterlandan literaturon. Krome la libro povas esti tre utila por la advokato, notario, librotena revizoro, imposta konsilisto, sociologo, kiel ankaŭ por la leganto kun ĝenerala intereso.

*La mendojn bonvolu adresi al: **Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam—Nederland.***